

Kultura Semajnfino de Kultura Centro Esperantista en Renens
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 471, 1972.10.18 & 21

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

De du jaroj Kultura Centro Esperantista organizas dufoje en la jaro kulturajn semajnfinojn, tio en Renens apud Lausanne. Tiuj renkontoj grupigas inter 80 kaj 100 personojn. Ili ekludas tre gravan rolon en la disvolviĝo de la esperanto-vivo en Svislando kaj eble jam en la najbaraj landoj norda Italio kaj okcidenta Francio.

A.- En tiuj semajnfinoj samtempe disvolviĝas kvar programoj. La esperantistoj estas en kontakto kun fakuloj, kies prelegoj tuŝas plej diversajn temojn. La esperanto-gelernantoj havas la okazon aŭdi pli facilajn prelegojn kaj sekvi lecionojn pri gramatiko kaj lingvo-ekzercado. Ĉiufoje inter dek kaj dudek neesperantistoj konatiĝas kun esperanto dank'al programita kaj aŭd-vida rapid-kurso. Vartas pri la infanoj kaj geknaboj kvin infanĝardenistinoj kaj geedukistoj.

Cl.- Jen kelkaj informoj koncerne al la prelegoj, kiujn oni povis aŭdi dum la du pasintaj semajnfinoj.

A.- Je la 13-a kaj 14-a de majo prelegis gesinjoroj Claude kaj Nicole Piron, getradukistoj ĉe Monda Organizaĵo pri Sano kaj Unuiĝintaj Nacioj kaj sinjoro Henri Vatré, kiu estas konata en la esperanto-literaturo sub la pseŭdonomo Henri Baupierre.

Cl.- Claude Piron parolis pri du temoj. Li raportis pri la kompleksa laboro de Monda Organizaĵo pri Sano, kie li estas tradukisto el la angla, ĉina, hispana kaj rusa francen. Tiu MOS estas malmulte konata organizaĵo. Ĝi utilas kiel centro por reciproka informado de registaroj koncerne sanecajn problemojn kaj ĉefe la staton de epidemiaj malsanoj en la mondo. Ĝi estas agentejo luktanta mondscale kontraŭ tiaj gravaj malsanoj en la mondo, kiel malario kaj dormmalsano. Ĝi kunordigas la sciencajn esplorojn pri kancero kaj kor-malsanoj. Ĝi helpas la malriĉajn landojn por organizi la sanecajn servojn, la medicinan instruadon, kaj la vakcinadojn.

A.- En alia prelego Claude Piron priskribis la ĉinan lingvon, kaj ni povis rimarki plurajn interesajn similecojn inter tiu tipe orienta izoliva lingvo kaj esperanto. Dum la amika vespero Claude Piron aŭdigis kantojn, kiujn li tradukis el plej diversaj lingvoj. Tiurilate li estas vera artisto, kaj ni foje intervjuje aŭdigos lin.

Cl.- Sinjorino Nicole Piron parolis pri la Unuiĝintaj Nacioj, kiujn ŝi konis dum sia traduka deĵorado en Nov-Jorko.

A.- Sinjoro Henri Vatré pritraktis la temon *Esperanto dum la lastaj 50 jaroj*. Li unue raportis pri la internaciaj konferencoj, kiujn organizis doktoro Pierre Bovet kaj sinjorino Henriette Ith koncerne al la instruado de esperanto. Li poste montris, kiel esperanto riĉiĝis rilate al la esprim-rimedoj, kaj li faris la portreton de la ĉefaj aŭtoroj, kiuj ludis decidigan rolon en poezio kaj prozo.

Cl.- Dum tiu prelego Henri Vatré aludis pri la graveco de la teorio de René de Saussure koncerne al la vortfarado. Esprimiĝis en la diskutoj la deziro, ke li pritraktu tiun temon pli detale. Tion li faris je la semajnfino, kiu ĵus disvolviĝis la 7-an kaj 8-an de oktobro.

A.- En tiu oktobra Kultura Semajnfino ankaŭ prelegis du ital-lingvanoj : Tazio Carlevaro, medicinisto kaj prezidanto de la Konsulta Komitato de Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Internacia Lingvo kaj Giuseppe Grattapaglia, la gvidanto de la esperanto-propagando ĉe la firmao FIAT.

Cl.- Sinjoro Tazio Carlevaro parolis pri la deskripto de antikvaj lingvoj kaj alfabetoj. Oni scias, ke multajn antikvajn lingvojn oni ne legas plu, ĉar ilia skribsistemo estas al ni nekonata aŭ ĉar la lingvoj mem ne estas plu konataj. Sed la laboro de kelkaj specialistoj kaj entuziasmoj permesis tamen la deĉifron de kelkaj el tiuj antikvaj lingvoj, ekzemple : la egiptajn hieroglifojn, la kojnoforman alfabeton, la lingvojn hetidan, minoan. Sinjoro Tazio Carlevaro klarigis, kiel tio estis ebla helpe de trafikaj ekzemploj kaj montris, kial ĝis nun la etruska lingvo restis nekonata.

A.- Sinjoro Tazio Carlevaro, helpe de tre belaj diapozitivaj, parolis pri la vivo kaj pentraĵoj de la pentristo Albrecht Dürer.

Cl.- Sinjoro Giuseppe Grattapaglia tuŝis temon, kiu estas ege aktuala : esperanto en komerco kaj industrio. Li parolis pri la rolo, kiun povus ludi la Lingvo internacia en komerco kaj industrio, pri la nunaj ŝancoj kaj atingoj de esperanto en tiu kampo, pri la terminaraj problemoj, kiuj estas malfacile solveblaj, ĉar ili dependas de la laboro de fakuloj, kiuj bedaŭrinde ne ekzistas. Poste sinjoro Grattapaglia raportis pri la favoraj cirkonstancoj, kiuj ebligis enkonduki esperanton en la mondkonatan industrian komplekson FIAT. Li donis praktikajn konsilojn kaj skizis laborplanon por ĉiuj, kiuj ŝatus disvastigi esperanton en aliajn industriajn kaj komercajn fakojn.

A.- La du venontaj semajnfinoj okazos en majo kaj septembro 1973.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012*